Heinrich Heine,

# Venas la jaroj kaj foriras

*tradukita de Corrado Grazzini*

Venas la jaroj kaj foriras
kaj tutaj generacio pasas kun ili;
sed la amo, la amo el mia kor'
ne malaperas.

Unufoje mi volus vidi vin ankoraŭ,
mi volus fali surgenue ĉe vi,
kaj volus diri mi, mortanta, al vi:
vin amas mi, virino!

*Traduko de la Germana poemo "Die Jahre kommen und gehen" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Corrado Grazzini.*

*Arg-510-1002 (2010-02-07 01:28:19)*

*Tiu ĉi traduko estas laŭvorta Esperantigo, ne rimita kaj ne havanta la versritmon de la germana-lingva originalo (Manfred Retzlaff). Ĝi aperis en la n-ro 1/1967, de la 16-a de Januaro 1967, en la Esperanta revuo "Heroldo" (laŭ indiko de s-ro Lars Kromann, Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo,* `lars.kromann@mail.dk`*).*

Heinrich Heine,

# Alvenas generacioj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Alvenas generacioj
Kaj ree iras for;
Sed ne formortas la amo
estanta en mia kor'.

Nur unufoje, mortonte,
Mi emus revidi cin
Kaj diri al ci surgenue:
"Mi amas vin, sinjorin'!" [2]

*Traduko de la Germana poemo "Die Jahre kommen und gehen" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-510-1003 (2010-02-11 11:57:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, uzis en mia Esperantigo la pronomojn "ci" ka "vin" por redoni tion, ke la poeto uzis en la lasta linio la germanan prepozion "Sie", per kiu oni alparolas fremdajn personojn. Sonas tio iom ironie aŭ moke. La poeto faris tion verŝajne intence por distancigi sin iom, kvazaŭ ŝerce.*

Heinrich Heine,

# Die Jahre kommen und gehen

Die Jahre kommen und gehen,
Geschlechter steigen ins Grab,
Doch nimmer vergeht die Liebe,
Die ich im Herzen hab.

Nur einmal noch möcht ich dich sehen,
Und sinken vor dir aufs Knie,
Und sterbend zu dir sprechen:
"Madame, ich liebe Sie!"

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-510-1001 (2010-02-07 01:26:20)*

*Aus dem Werk "Lyrisches Intermezzo, Gedichte I, Nr. 25". Siehe auch die Internetzseite* `http://www.textlog.de/23223.html`*.*

[2] aŭ eble:
"Madame, mi amas vin!";
ĉar ankaŭ en la germana-lingva originalo troviĝas la franca vorto "Madame".